**Kunveno: merkredon la 15an de septembro 2021a**
**je la 20.00 h. en “De Uitwijk”,**
**Generaal Pattonlaan 124, Eindhoven.**
**tel. 040-2450590.**

# Temo: 18 monatoj kun la korona viruso

En la lastaj jaro kaj duono la mondo kaj niaj vivoj radikale ŝanĝiĝis. La korona viruso influis multajn facetojn de nia moderna vivo. Kredeble la plimulto el ni intertempe iel alkutimiĝis, kaj iom post iom adaptiĝas, al la nova situacio. Iuj aferoj povus reveni al la antaŭa stato, sed multaj estos por ĉiam aliaj.

Ni esperas ke vi volus kun ni dividi iujn facetojn de tio, rilate al via vivo. Ekzemple pri:



- Virtualaj esperantaj aranĝoj: Ĉu vi ĉeestis iu(j)n? Kiu(j)n? Se jes, kiaj estas viaj spertoj?
- Ĉeestaj esperantaj aranĝoj: Ili dum pli ol jaro ne okazis. Intertempe estas planataj novaj aranĝoj, sed ĉu vi ĉeestos?
- Laboro: Kiel tiu situacio ŝanĝiĝis? La oficiala regulo estas ankoraŭ ke oni laboru de hejme se tio eblas. Iuj entreprenoj sugestas al siaj dungitoj ke laborado en la oficejo estas dezirata.
- Familio: Kiel vi kaj via familio nun rilatas unu al la alia?
- Ŝatokupoj (ekster Esperanto): Kio ŝanĝiĝis?
- Kiujn aliajn efikojn la viruso havis al via vivo?

Atentu: **eble ni kunvenos en alia salono; rigardu la anoncon!**